La esperanta spiono 005

Aventuro el la lernilo *Tendaraj tagoj*, kajero 2

La dua kajero de *Tendaraj tagoj* estas kurslibro por instruisto-trejnaj kursoj kaj seminarioj gvidataj de ĝia aŭtoro. Ĝi estas ekzemplo de pure cel-lingva lernilo, apoganta la situaci-komunikan lernadon. En tiaj kursoj, ni kutimas tralegi kaj studi komune la rakontajn paĝojn de la aventuro de 005 (kiun la tendaranoj ene de la libro verkis), prepare al plenumo de rol-ludo kaj kunlaboriga ekzerco. Pro la limigita tempo en nia kurso, ni petas vin anticipe legi la sekvajn paĝojn kaj esti pretaj respondi la demandojn fine.

Krome, bonvolu pripensi pri la unua paĝo: kio povus esti la gramatika temo kiun la teksto fortigas. Kaj pri ĉiuj paĝoj: kiuj estas la movadaj instancoj kaj fenomenoj aluditaj tra la teksto.

Bonan anticipan legadon!

Stefan MacGill, Sept, 2004.

33 Sekreta misio!

Forta granda viro ripozas apud naĝejo. Apud li kuŝas belaj junaj virinoj. Ili ridas kaj babilas. Li estas spiono, sed tio estas granda sekreto!

Servisto *(alvenas kun telefono kaj krias):* Telefon-voko por 005! Kie estas 005? Telefon-voko por la sekreta spiono 005!
005: Jen mi! Silentu! Ne kriu al ĉiu! Mi estas la spiono, sed neniu rajtas scii tion. Donu la telefonon.

(Li parolas telefone, poste li parolas al la plej bela knabino.)

005: Sonja, mia kara, mi tre bedaŭrinde devas foriri. Mi ne volas forlasi vin, sed mia ĉefo vokas min.
Sonja: Mi komprenas. Vi ne rajtas resti. Mi amas vin! Revenu baldaŭ! Ĝis!

(Post kelkaj minutoj en la helikoptero, 005 estas en la oficejo de Z, la ĉefo)

005: Ĉu vi vokis min, Z?
Z: Jes, 005, ni havas novan mision por vi.
005: Bone! Nova aventuro. Pri kio temas?
Z: Grava afero! Rigardu la bildojn!En la bildo vi vidas fenestron de la Centra Oficejo!



005: Ĝuste mi ne vidas ĝin! Iu rompis ĝin!
Z: Fakte. Ni ricevis tiujn faksajn bildojn de la CO en Roterdamo. Iu rompis tiun fenestron, eniris la bibliotekon kaj ŝtelis la Unuan Libron de Zamenhof.
005: Ĉu temis pri la pola, rusa, germana aŭ franca versio?
Z: Ĉiuj kvar! Tiuj libroj estas tre valoraj. Neniu estas pli valora. Ni devas retrovi ĉiujn kvar librojn!
005: Ĉu oni ŝtelis ankaŭ komputilojn, foto-kopiilojn, faksilojn, skanilojn, printilojn, polvo-suĉilojn...
Z: Ne, ĉiu maŝino restis; oni ŝtelis neniun maŝinon.
005: Ĉu oni ŝtelis aliajn librojn?
Z: Ne. Ili ne tuŝis La Fundamenton. Ĉiu alia libro restis. Ankaŭ *Tendaraj tagoj.*
005: Bone – ***ni*** loĝas en tiu libro. Ĉu la ŝtelistoj lasis spurojn?
Z: Nur unu. La polico trovis neniun spuron. Neniun fingro-spuron, neniun ŝu-spuron,

neniun nom-karton. Sed nia agento 004 vizitis la oficejon. Li trovis inter la paĝoj de *Plena Ilustrita Vortaro*, ĉe la litero V pecon da papero kun informoj sur ĝi. Rigardu!



005: Volapukistano!? Ĉu ĝi estas membro de Unuiĝintaj Nacioj?

Z: De UN? Ne, kaj neniu aŭdis pri ĝi. Neniu trajno aŭ aviadilo iras al ĝi. Vi devos iri per ĉevaloj aŭ kameloj. Ni volas scii, ĉu la lando vere ekzistas. Kaj vi devas retrovi la Unuan Libron. *(Son! Son!)* Pardonu, la verda telefono – grava mesaĝo – *(Li levas la aŭskultilon.)* Saluton, Espion ĉi tie, Z parolas. Jes! Vieno? Ho, la Muzeo. Jes, kaj... Ho, ve! ...jes, mi komprenas. Dankon! *(Li remetas la aŭskultilon.)*

005: Malbona informo?

Z: Jes, nulo-nulo-kvin. Serioza afero! Komuniko de Esperpol pri la Muzeo en Vieno. Iu rompis la pordon, eniris kaj ŝtelis la Unuan Libron ... kaj ankaŭ ... La Fundamenton!

005: Iu tuŝis la fundamenton!? Ve!! Neniu rajtas tuŝi La Fundamenton! Ĉiu scias tion! Terure!

Z: Iu ne nur tuŝis ĝin, sed ŝtelis gin! Klara afero! Verda Alarmo! Mi devas tuj proklami verdan alarmon! Nun, for la neŭtralismon! Ni devos batali kontraŭ la terorismo kaj la neologismo!

005: Jes! Al Volapukistano, per la unua kamelo!

Z: Bone! Sed unue iru al nia stokejo kaj ricevu helpilojn kaj instrukciojn. Ni konstruis novan sekretan stokejon. Neniu vizitos aŭ trovos ĝin. Perfekta loko. Jen la adreso. Ĝis revido kaj bonŝancon!

005: Dankon. *(Li paŝas al la pordo.)*

Z: Nulo-nulo-kvin, memoru, ni ne povos helpi vin dum la misio. Vi estos sola. Se iu kaptos vin, neniu savos vin!

005: Kompreneble. Same estas dum ĉiu misio. Tio estas normala por sekreta agento dum misio. Neniu problemo – neniu kaptos min! Ĝis revido!

(Li eliras mem-fide. La tendaranoj aplaŭdas laute.)

34. La Preparo

005: Ĉu, ha, jes, mi trovis la adreson. Jen la ŝildo: Akademio de Esperanto. Kaj la plastaj araneofadenoj. Nun la sekreta kodo – kvin frapoj kaj la Esperanto-himno *(Li fajfas la himnon 'La Espero'. Maljuna paro, ge-sinjoroj Lapre, alvenas kaj malfermas la pordon).*



s-ro Lapre: Bonan tagon, 005, bonvenon. Ni atendis vin. Ni preparis ĉiujn helpilojn por vi.

s-ino Lapre: Rigardu, dika palto kontraŭ la malvarmo en la alpoj, batilo kontraŭ insektoj en la dezerto, ombrelo kontraŭ pluvo, elektra poŝlampo kontraŭ la mallumo, aspirino kontraŭ kapdoloroj kaj unu kamelo-selo.

005: Kontraŭ kio ĝi estas?

s-ro Lapre: Kontraŭ via postaĵo.

005: Hm. Ĉu mi rajtas kunporti pafilon?

s-ro Lapre: Ne! Absolute, ne. Ni estas pacaj batalantoj! La pafiloj estas por 007, ne por vi.

s-ino Lapre: Sed via palto estas paf-rezista. Ĝi protektos vin kontraŭ pafoj. Jen falsa barbo por kaŝi vian vizaĝon, kaj jen mapo.

005: Dankon. Ĉu ĝi estas mapo de Volapukistano?

s-ro Lapre: Ne. Tion ni ne havas. Ĝi estas de Trikistano – se via kamelo eraras pri la vojo...

005: Hmmm! Ĉu mi rajtas kunporti pasporton?

s-ino Lapre: Jes. Ni preparis por vi svisan pasporton. Vi estas komercisto el Zuriko. Vi volas malfermi bankon en Ŝlejerstad, la ĉefurbo de Volapukistano.

s-ro Lapre: Vi kompreneble absolute ne rajtas paroli Esperanton en la lando. Vi devos paroli la okcident-zurikan formon de la svis-germana.

005: Senprobleme!

s-ino Lapre: Vi rajtas paroli Volapukon, se vi sukcesos lerni ĝin dum via vojaĝo trans la dezerto. Ĉi tiu libro helpos vin.

005: ... Volapuko sen larmoj, hm, kaj tiuj libroj...?

s-ro Lapre: *Kirlistano je dek dolaroj tage* kaj *Kelkaj Psikologiaj Aspektoj de la Hom-Kamela Komunikado*.

005: Bone, mi legos ilin sur la kamelo. Ĉu mi devas scii aliajn detalojn?

s-ro Lapre: La palto estas ne nur pafo-rezista, ĝi estas ankaŭ akvo-rezista. Tiru la rimenon kaj vi povas transformi ĝin al boato. La insekto-batilo enhavas du-direktan radion, la ombrelo estas paraŝuto, vi povos salti sekure de aviadilo. La poŝ-lampo estas sekreta fotilo...

s-ino Lapre: ...kaj la lasta aspirino en la botelo estas venena. Se volapukisto kaptos vin kaj minacos vin per neologismoj, rompu la pilolon per viaj dentoj kaj en kvin sekundoj...

005: Koran dankon. Ho, vi estas ĉarma paro!

s-ino Lapre: Jen viaj biletoj por la aviadilo...
s-ro Lapre: ...kaj poste por la kamelo. Ĝis revido kaj bonŝancon!

La tendaranoj ĉiuj aplaŭdas laŭte kaj entuziasme. Kiuj verkis la teatraĵon, estas tre kontentaj. Gvidanto Mateo ne scias, ĉu ridi, ĉu plori.

40. Volapukistana aventuro

005: Mi ne komprenas. Kial oni ŝtelis la unuan libron? Eble oni volas vendi ĝin multekoste?
Kamelo: Eble. Mi ne scias.
005: Sed nur esperantistoj volos aĉeti ĝin. Kaj ili ne estas riĉaj. Verŝajne la ŝtelistoj kontaktos la esperantistojn kaj redonos la libron nur se faros ion malagrablan — ekzemple, lernos kaj uzos Volapukon. Tio estas pli verŝajna. Kion vi opinias?
Kamelo: Eble. Mi ne scias.
005: Aŭ eble ili volas reformi Volapukon kaj ŝteli ideojn de Esperanto.
Kamelo: Eble. Mi ne scias.
005: Ne, tio estas malprobabla — tre duba. Sufiĉas simple lerno-libro. Ili ne bezonas la unuan libron por tio.
Kamelo: Eble. Mi ne scias.
005: Kamelo! Dum tri tagoj dum nia vojaĝo tra la dezerto vi diras nur: ‘Eble. Mi ne scias’. Ĉu vi ne povas diri ion alian?
Kamelo: Eble. Mi ne scias.

005 kaj la kamelo eniris Volapukistanon kaj trovis kastelon supre de alta monto, kie verŝajne kuŝas la unua libro. Nur unu tre mallarĝa vojo iras laŭ la monto-flanko al la kastelo. 005 supreniris kaj staris antaŭ la ĉefa pordo. Sed li ne povis uzi tion, ĉar kvar fortaj gardistoj gardis ĝin.

"Kamelo, atendu min," diris 005: "Mi kaŝos min per mia palto kaj promenos ĉirkaŭ la kastelo kaj provos trovi mal-ĉefan enirejon." Li vidis fenestreton alte en vertikala muro super lago.

"Hmm," pensis 005: "Eble mi povos pafi sagon kun ŝnuro supren al ĝi, grimpi laŭ la ŝnuro super la krokodiloj en la lago kaj eniri la fenestron. Hmm. Sed eble mi maltrafos la fenestron. Eble mi glitos kaj falos. Tiuj krokodiloj ne ricevis tagmanĝon ankoraŭ. Ne tro bona plano. Tio estas plano por 007, ne por mi."

005 vidis pli bonan solvon. Li vidis pordeton kun ŝildo: **Enirejo por vendistoj**. Jen pli facila vojo. Apud tiu pordo staris nur unu gardisto kaj ne tro forta.

"Venu, kamelo!" li vokis: "Ni eniru la kastelon!"

Ili silente eniris, sed la gardisto vidis lin kaj kriis: "Haltu! Kion vi volas? Kiu vi estas? Volapukisto aŭ malamiko?"

"Ho!" pensis 005: "Mi devas elpensi ruzan kaŝ-nomon." Li diris laŭte (kaj mallerte) en Volapuko: "Saluton! Venu la Volapuka Venk'! Mi estas amiko! Mia nomo estas Pinta Stel. Mi estas ... kamel-vendisto!"

"Kion!!??" kriis la kamelo proteste.

"Mi havas unu kamelon. Ĝi estas ne tro inteligenta. Ĝi povas diri nur kvin vortojn..."

"Ne tro inteligenta!!!??? Mi?" laŭte protestis la kamelo.

"...pardonu, sep vortojn. Sed ili estas en Volapuko!"

"Unue mi faros la plenan korpo-serĉon." respondis la gardisto, kaj esploris la poŝojn kaj korpon de 005: "Jes, vi havas plenan korpon. Via kamelo ankaŭ. Mi vokos la ĉefon de nia aĉeto-fako. Li scios, ĉu ni bezonas stultan kamelon."

La gardisto foriris. 005 kaj la kamelo estis solaj en la kastelo!

Kion ili faru? Diskutu tion!

41. Kamel-vendado

Solaj en la kastelo! 005 tuj serĉis tra la ĉambro. Li serĉis planon aŭ mapon de la kastelo. Li serĉis sub la tablo, malantaŭ la bildoj, super la ŝrankoj, sub la tapiŝo, inter la libroj. En la lasta loko, kie li serĉis (tir-kesto kun ŝildo **Planoj de Kastelo**) li trovis... planon de la tuta kastelo. Sed la sono de la piedpaŝoj de la gardisto interrompis lin. Rapide 005 malfermis la falsan ĝibon de la kamelo kaj enpuŝis la planon. 005 staris antaŭ la ĝibo por kaŝi ĝin, ĉar li ne sukcesis bone refermi ĝin.



"Mi rajtas aĉeti la kamelon, nur se ĝi povas diri ok vortojn." raportis la gardisto.

"Kamelo," demandis 005: "ĉu vi povas diri ok vortojn?"

"Eble. Mi ne scias." diris la kamelo.

"Jen, kvar vortoj!" ĝoj-kriis 005: "Diru ion pli!"

"Kion?" demandis (aŭ diris) la kamelo.

"Kvin vortoj!" li asertis al la gardisto, kaj al la kamelo: "Kion? Mi ne scias. Rakontu pri vi mem!"

"Tro inteligenta! tro inteligenta! tro inteligenta!"

"Sufiĉas! Silentu!" protestis la gardisto: "Nur du vortojn pli mi aŭdis. Sep entute. Mankas unu!"

"Diru ankoraŭ unu vorton!" insistis 005: "Ne gravas kiun vorton vi diru. Nur diru unu vorton."

"ZAMENHOF!!" kriis la kamelo fiere:

"Ha!" miris la gardisto: "La kamelo estas esperantista spiono! Danĝero! Alarmo! Verda atako! Sub-fosa agento! Mi esploros vian kamelon denove! Ĝi havas falsan ĝibon!"

"Vi ne kaptos nin!" kriis 005 kaj saltis al la tablo kaj al la lampo. La kamelo batis la gardiston per unu hufo. 005 glitis kaj falis de la lampo. La kamelo puŝis lin per la vera ĝibo al la pordo kaj eskapis.

"Bone, ni sukcesis eskapi! Aferoj bone evoluas!"

"Ne tro inteligenta!" diris la kamelo.

Kaj li pravis.

"Jes, vi pravas. Aferoj malbone evoluas. Malantaŭ ni dudek gardistoj kuras el la kastelo. Kaj antaŭ ni venas dek gardistoj de la alia direkto. Mi devas eskapi, sed laŭ la vojo, mi ne povas. Kamelo, batalu kontraŭ dum mi eskapas kun la plano!"

"Ho, brila plano! Koran dankon!" diris la kamelo kun klara ironio.

005 prenis la planon el la ĝibo, prenis la ombrelon kaj saltis for de la vojo malsupren. Li malfermis la ombrelon. Ĝi formis paraŝuton. Li ŝvebis suben al la rivero.

SPLAŜ! Li eniris la akvon. Li de-prenis la palton kaj tiris la rimenon. Ĝi formis boaton. Li trovis la aspirin-botelon kaj prenis unu (ne la lastan) ĉar li havis kap-doloron. Li prenis la insekto-batilon, batis kelkajn insektojn kaj poste li per la radio raportis al Z pri la tuta misio.

005: Vokas 005 el malseka Volapukistano. Mi eniris la kastelon, trovis kaj ŝtelis planon de ĝi...

Z: Bone, bone. Bona evoluo!

005: ...sed mia stulta kamelo diris ‘Zamenhof’, do mi devis eskapi. Ili kaptis mian kamelon, kaj mi ne sukcesis trovi la Unuan Libron...

Z: Malbone, malbone. Malbona evoluo.

005: ...sed ĝi certe estas en la kastelo. Ni devas prepari novan mision. Ni devos uzi helikopteron aŭ submarŝipon.

Z: Mi aranĝos tion. Vi studu la planon kaj preparu la novan mision. Ĉu ni sendu freŝan kamelon?

005: Ne dankon! Unu kamelo estis pli ol sufiĉa!